

LA  
VERDA  
STELO



ESPERANTO  
NEDERLAND

SEKCIO GRONINGEN-DRENTE  
&  
FRISA ESPERANTISTA RONDO

decembro 2010



## LA VERDA STELO

eldono de

### ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

#### ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

##### prezidanto

s-ro J.B. Swenker  
T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC Groningen  
tel. +3150 527 45 72  
retadreso:  
johan.swenker@xs4all.nl

##### sekretario

s-ino N.R. Kiel-Klunder  
G. Sterringastraat 60  
9728 VV Groningen  
tel. +31505251436  
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

##### kasisto

s-ro L. Staghouver  
Julianalaan 25  
9781 ED Bedum  
tel. +3150 301 40 15  
retadreso: luitstaghouver@home.nl

#### FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman  
Westerein 14 a  
8571 GB Harich (Frl)  
tel. +3151 460 22 72  
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

##### ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

##### kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1  
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas  
de la 19h45 ĝis la 21h45

##### Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC Groningen  
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

##### redakcio

J.B. Swenker kaj N.R. Kiel-Klunder  
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



## Enhavo

- 3 Klubkunvenoj
- 3 Naskiĝtagoj
- 4 Kunvenejo
- 4 Pri la nordo
- 11 Urĝa peto
- 11 Averta kontraŭ dihidrogena monooksido
- 12 Sankta Francisko
- 13 La 6-a Azia Esperanto-kongreso
- 14 Van de penningmeester
- 15 Sankta Nikolao-festo
- 15 Averta.....

#### Contributie Esperanto Noord-Nederland 2011

<b>Afdelingslid</b> (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
<b>Gezinslid</b>	€ 6,25
<b>Donateur</b> (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op Ing banknr. <b>3822472</b> t.n.v. <b>ESPERANTO NOORD-NEDERLAND</b> te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **ESPERANTO NEDERLAND.**

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:  
78 68 44 167 (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland, Middenweg  
587, 1704 BH Heerhugowaard.

<b>Lidmaatschap</b> (incl. abonnement Fen-X)	€ 30,00
<b>Gezinslid</b>	€ 8,00

# Klubkunvenoj

## januaro

- 6 vivanta gazeto  
20 gastpreleganto Ralph Schmeits

## februaro

- 3 gramatiko  
17 jarkunveno

## marto

- 3 kompari du tradukojn  
17 Groningen-a ludo  
31 solvi enigmojn

## aprilo

- 14 Groningen-a ludo  
28 Ĉu via prezentado?

## majo

- 12 kune manĝi

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj  
ŝanĝojn vi trovos en nia retejo  
sub la rubriko

**Aktuale**

<http://pingveno.nl/klubo>

## januaro

- 4 W. van Ganswijk-Vlasblom  
27 Ineke Emmelkamp  
30 A.W. van der Veen

## februaro

- 11 H. van Kappen  
17 A.A. Bellekom  
18 S. Czeswinska  
22 C. Boer-Pierie  
28 L.H. Staghouver

## marto

- 24 E.J. Begeman

## aprilo

- 1 T. Bulk-Beenen  
6 P. Kappen-v.d. Kamp  
7 A. v.d. Meer, Ans Hooyman  
17 M.K. Heide

# Naskiĝtagoj



## Kunvenejo



En la pasintaj jaroj daŭre malkreskis la nombro de ĉeestantoj de la kunvenoj. Ĉu ankoraŭ necesas lui salonon por niaj kunvenoj? Se vi havas opinion pri tio, nepre venu al la jarkunveno kiu okazos en la 17-a de februaro.

## Pri la nordo

**2 septembro 2010**

Estis la unua kunveno post la somero kaj tradicie la ĉeftemo estis *ferioj*. Sed antaŭ tio ni parolis pri kelkaj aliaj aferoj.

La proponojn pri la estonteco de Esperanto Nederland ni pridiskutis jam antaŭe. Dum la jarkunveno de Esperanto Nederland pluraj personoj reagis al ili. En FEN-X n-ro 4 (julio-aŭgusto) oni povas legi pri tiu diskuto.

Wil diskutigis nin pri kelkaj gramatikaĵoj.

- Ĉu estas *inter la 12-a kaj la 6-a horo aŭ inter la 12-a kaj la 6-a horoj*?
- Ĉu estas *kiel danko ili invitis lin aŭ kiel dankon ili invitis lin*?

Ni havis diversajn opiniojn pri ĉi tiuj malfacilaĵoj, sed samopinias pri la solvo: Se oni dubas pri iu ajn gramatikaĵo, oni prefere esprimu alimaniere kion oni volas sciigi.

Pri la ferioj:

En aŭgusto post pli fruaj ferioj en la Teŭtoburger-arbarego Luit kaj Monica mallonge feris en *Twente*, kie ili interalie vizitis la bienegon *Singraven*. Tiu ludas gravan rolon en libro de la pentristo *Erik van Ommen*. La libro titolas *La hirundoj de Singraven*. Per belaj bildoj kaj interesaj tekstoj Erik van Ommen raportas pri la flugo de kamphirundo (domhirundo) inter ĝia travintrejo en Afriko kaj la bieno de Singraven.

Gonda veturis dufoje al Germanio. Unue ŝi restis kelkajn tagojn en Bonn. Tie ŝi vidis interesan faldfolion pri la kastelo de *Schwerin*. Pro tio ŝi poste veturis tien, proksime al *Rostock* (en la iama DDR). Tiu regiono (*Mecklenburg-Vorpommern*) estas konata pro la multaj lagoj. En la kastelo troviĝas nuntempe muzeo kaj kelkaj oficejoj. Princo *Hendrik*, la edzo de nia reĝino *Wilhelmina*, naskiĝis en Schwerin. Nelly veturis kun sia edzo per aŭto kaj pramo al *Cornwall* (Anglio) kaj tie ili rondveturadis. Ili vizitis urbojn, kastelojn kaj *Stonehenge*. Ili faris aŭdan rondpromenadon inter la altaj ŝtonoj. Estas diversaj teorioj pri la kialo de la konstruado de Stonehenge.

Johan restis hejme. Li estas bonŝanca, ĉar lia edzino estas same "veturema" kiel li. Krome, ili havas propran domon kun ĝardeno, kaj pro tio Johan ne enuis. Li laboris interalie en la ĝardeno kaj renovigis la putrintajn partojn de paŝponteto kaj teraso.

Wil veturis per flugmaŝino al Hungario por partopreni la 60-an KELI-kongreson en la malgranda vilaĝo *Beregdaróc*, kie partoprenis 44 personoj el 14 landoj. Antaŭ kaj post la kongreso Wil restis kelkajn tagojn en la domo de amikino en

Budapeŝto. La kongreson bonvenigis lokaj pastoro (protestanto) kaj pastro (katoliko). Nur unu el ili surhavis kravaton. Johan (prave) sugestis, ke la persono sen kravato estis la pastro. Wil montris dekojn da fotoj pri sia feriado en Hungario.

### 16 septembro

La kunveno komenciĝis iomete malbone. Wil ne povis ĉeesti, ĉar ŝi suferis akcidenton kun la biciklo. En la urbocentro ŝi falis kaj rememoris nur, ke ŝi kuŝis surtere. Per ambulanco oni transportis ŝin al malsanulejo. Policistoj okupis sin pri la biciklo. Feliĉe ŝi resaniĝis rapide.

Ankaŭ malagrabra estis la rakonto de Ineke. Dum multaj jaroj ŝi laboris ĉe la polico en la centro de la urbo Groningen. De novembro ŝi devos labori en Frislando. La polico ne plu estas urba sed regiona. Kaj la laboro de Ineke translokiĝos al Frislando. Oni diras, ke tiel la kostoj de la polico malplialtiĝos. Ĉu tio estas vera, mi ne kredas. Ja mi scias, kiu pagas: oficistoj kiel Ineke, kiuj bezonos multe pli da tempo por atingi la oficejon.

El Kubo ni ricevis raporton de *Yoandra*. La antaŭan jaron ŝi estis ĉe ni en Eŭropo por varbi por la UK en Kubo. Bedaŭrinde ŝi mem devis labori dum la kongreso, sed la edzo kaj la infanoj ja ĉeestis. La infanoj iris eĉ al la IJK en *Santa Cruz del Norte*.

La programo de la 16-a de septembro temis pri *sanktuloj*. Gonda ŝatus paroli pri *Sankta Hillegonda*. Sed pri tiu sanktulo oni preskaŭ ne povas trovi informojn. Gonda do traktis alian sanktulon: *Sankta Francisko de Asizo*.

Nelly decidis paroli ne pri sia propra nomo sed pri tiu de sia filino. Ni do aŭdis ion pri *Sankta Lucia de Sirakuzo*.



Sankta Lucia vivis en la tria jarcento kaj mortis en 303 pro persekuto. Kvankam Svedio ne estas katolika lando, la svedoj tamen festas la tagon de Sankta Lucia. La Lucia-festo estas lumfesto, kiu okazas la 13-an de decembro. Knabinoj portas kandelojn surkape, samkiel Sankta Lucia antaŭ 1700 jaroj. Sed nuntempe la kandeloj funkcias elektre, kompreneble.

### 30 septembro

Ĉi tiun ĵaŭdon estis ludvespero.

Iam mi rete ricevis la Bjalistok-ludon. Mi pensis, ke la ludo estos bone ludebla, ĉar eĉ se mi ne scias multe pri Bjalistoko, la aliaj eble scias pli pri la naskiĝurbo de d-ro Zamenhof. Mi ege eraris! Multaj demandoj estis malfacilaj! Tamen ni amuziĝis kaj ni decidis fabriki propran ludon pri nederlandaj aferoj. La vesperon, en kiu ni ludos ĝin, vi trovas en la listo de klubkunvenoj. Ĉu vi scivolas, ĉu vi scias la respondojn pri Bjalistoko? Mi provokas vin respondi!



- *Promeno de la familia domo de Ludoviko al la urboplaco ne estis longa. Taksu en metroj la distancon. Vi povas erari je 100 metroj.*
- *Kiun rakonton pri kiu teatraĵo kongruas kun la bjalistoka urbodomo?*
- *Kiom da membroj aliĝis al la Zamenhof-Societo en Bjalistoko en la jaro 1930? Vi povas erari je 50.*
- *Kiaj substantivoj de vi konataj sonas simile en la pola kaj Esperanto kaj signifas la samon? Diru minimume kvin.*

### 14 oktobro

Malferma vespero.

Kutime ni povas bonvenigi ne multajn interesiĝantojn dum la ĉiujara Malferma Vespero. Escepto estis tiu de la 14-a de oktobro 2010. Tiam ĉeestis 20 personoj, inter ili 10 neesperantistoj, 2 kursanoj kaj 8 membroj. En *Gezinsbode* estis menciite, ke Ineke Emmelkamp rakontos pri sia vojaĝo al Mongolio per la *Transsiberia Eksprestrajno*. Tiu artikoleto inspiris ĉeesti tri personojn.

Wil varbis inter la anoj de siaj naĝklubo kaj virinklubo po kvar personojn.

Johan bonvenigis la ĉeestantojn, disdonis papereton kun 10 demandoj por pridiskuti poste. Dum la kafotrinkado oni povis foliumi du librojn de Ineke pri ŝia vojaĝo. Post tio ŝi komencis rakonti, kaj ni

aŭdis pri ŝiaj travivaĵoj kun internacia grupo de 25 personoj en la trajno, en Moskvo, Krasnojarsk, Irkutsk kaj surŝipe sur Bajkalo. Fine ili alvenis en Ulanbatoro por partopreni kongreson de 200 personoj, grandparte el Oriento.

Ŝi raportis pri tiu kongreso kaj la aŭtobusvojaĝo post la kongreso tra la sudo de Mongolio kun 12-persona grupo.



Ĉiuj ĉeestantoj aŭskultis ŝin kun intereso. Aplaudon ŝi ricevis kiel dankon. Post paŭzo kun denove kafo, Johan pritraktis la antaŭe disdonitajn demandojn kaj la respondojn de la ĉeestantoj.

La demandoj estis:

1. Kent u een land waar Esperanto de voertaal is?
2. In hoeveel landen wordt Esperanto gesproken denkt u ?
3. Hoeveel esperantisten zijn er?
4. Op welke andere taal lijkt Esperanto het meest?
5. Waar ontmoeten esperantisten elkaar?
6. Hoe maak je in het buitenland contact met esperantisten?
7. Waarom zouden mensen Esperanto gaan leren?
8. Waar vind je informatie over Esperanto?
9. Waar kun je Esperanto leren?
10. Heeft u nog een vraag?

Post tio Wil van Ganswijk havis la okazon prezenti provlecionon. Ŝi komparis la nederlandan lingvon kun Esperanto kaj montris kiel ŝi instruas Esperanton.



Per malgrandaj objektoj ŝi vivigis sian instruon, kaj la konkludo de la neesperantistoj estis, ke Esperanto ilin allogas. Unu aŭ du vere intencas la lingvon eĉ eklerni.

Nelly prizorgis la kafon kaj teon bonege kaj eĉ regalis nin per pecoj de fromaĝo kaj kolbaso.

Ĉiujn dankante, Johan fermis la kunvenon kvaronon antaŭ la deka.


## 28 oktobro 2010

Okazis du kunvenoj temantaj pri Ulanbatoro. La unua estis dum la malferma vespero. Ineke havis la ideon allogi homojn per nederlandlingva prezentado pri sia vojaĝo. Du semajnojn poste ŝi prelegis pri sia vojaĝo denove, sed tiam en Esperanto.

Kiel kutime ni komencis babili. Luit diris ekzemple, ke li vizitis Bets Dodebier en Zuidlaren. Wiebren diris, ke li aliĝis al la UK en 2011 en Kopenhago. Ni aŭdis ankaŭ pri Jozef, kiu nun estas triajara studento.

La Germanan Esperanto-Kongreson okazigas ĉiujare la Germana Esperanto-Asocio, kutime dum la pentekostaj festotagoj. En 2011 kunorganizos ĝin Esperanto-Nederland. Tiel ĝi iomete fariĝos kiel iama *Faulhaber-semajnfino*. Sed la kostoj estas laŭ germanaj normoj. Tio signifas, ke nederlandanoj estas eksterlandanoj, pro kio ni pagos malpli altan kotizon. Bone, ĉu ne?

Ineke do prelegis pri Moskvo, la vojaĝo per transsiberia eksprestrajno, la kongreso en Ulanbatoro, kaj pri la rondvojaĝo en Mongolio. En Moskvo Ineke vizitis la *Katedralon de Kristo Savinto*. La katedralo havas kvin turojn, ĉar dum la konstruado respondecis kvin gravuloj. Ineke diris, ke la komunistoj malkonstruis la katedralon, kaj ke la kelo fariĝis naĝejo.



Kiam ŝi diris tion, mi pensis, ke konserviĝis la tegmento kun la belaj orkoloraj kupoloj. Sed verkante ĉi tiun raporton, mi interretumis, kaj vere, en 1931 la katedralon Stalin tute detruis. Oni rekonstruis ĝin inter la jaroj 1994 kaj 2000. Kaj nun la belega katedralo situas denove apud la rivero *Moskva*.

Oni konsilis al Ineke kunporti libron por legi dum la vojaĝo. La konsilanto ŝatas legi, sed Ineke vojaĝis por vidi la pejzaĝon. Ŝi baldaŭ rimarkis, ke legante ĝui la pejzaĝon ŝi ne povas.

Post la kongreso ŝi vojaĝis tra Mongolio. Tipa mongolia konstruaĵo estas *ovoo*, kiu estas stako de ŝtonoj. Ĉiu vojaĝanto ĵetu ŝtonon sur la stakon, kaj ĉirkaŭiru ĝin trifoje. Tion farinte, la vojaĝanto prosperos. La kovrilpaĝo montras tian *ovoon*. La bluaj silkaj tukoj estas oferaĵoj.

### 11 novembro 2010

Temo de la vespero: *Intertajde marvadi*.

Wil atentigas Johan pri artikolo pri matematiko en *Horizontaal*. Ŝi atentigas nin pri la novaj retpaĝoj de *edukado.net*. Katalin Kovats invitas nin ĉiujn (kaj ne nur nin) partopreni la KER-ekzamensesion en februaro 2011 (KER = Komuna Eŭropa Referenckadro). Neniu el la ĉeestantoj intencas ekzameniĝi.

Wil demandis, kiu el ni iam vidis la interretan anoncon (en Google) pri la Esperanto-kurso de ŝi. La anonco estas montrata oftege, kaj pli ol 300-foje ĝi jam estas alklakita.

Kelkaj el la ĉeestantoj vizitos la Malferman Tagon de UEA en la 27-a de novembro. Kelkaj partoprenos la venontan UK-on en *Kopenhago*, kelkaj la renkontiĝon en *Münster* (de la 10-a de junio 2011 ĝis la 13-a inkluzive). Kaj kelkaj partoprenos la venontan studosemajn-finon en *Schoonloo* (de la 11-a de marto 2011 ĝis la 13-a inkluzive).

Gonda klarigas, ke ne al ĉiuj membroj ŝi povas sendi gratulkarton, ĉar de kelkaj membroj ŝi ne scias la naskiĝdaton. Eble Ineke ja scias tiujn datojn. Ineke kaj Gonda komparos la informojn pri la membroj.



La preleganto de ĉi tiu vespero estas *Harm Roeters*. Harm vizitadas preparan kurson por *marvadgvidanto*.

La suno kaj luno grave influas la akvonivelon de la oceanoj kaj maroj (alfluo kaj refluo). Precipe se la tero, luno kaj suno troviĝas en rekta linio, la altiraj fortoj (la gravito) de la luno kaj suno estas grandaj. Sed ankaŭ la ventodirekto kaj ventrapido influas la akvonivelon.





Harm kunportis grandan tornistron, en kiu li jam kelkfoje kunportis fokidon perdintan sian patrinon. Sed en la granda dorsosako povas enhavi ankaŭ la pakaĵon de aliaj partoprenantoj de intertajda marvado, kiuj mem ne plu povas ĝin porti. Grava parto de gvidantekipaĵo estas la ĉapo. Dum intertajda marvado grave efikas la temperaturo. Malvarmeco kaj troa varmeco estas danĝeraj. Pro tio ĉapo aŭ alia kapvesto estas nepraĵo, ĉar oni perdas trionon de la korporvarmo elkape. Aliaj gravaj atributoj de marvadgvidanto estas raketo (kiu estas deviga se estas partoprenantoj), kompasoj, ŝnuro, bastono kaj bandaĵo, (i.a. kun medikamento kontraŭ meduza veneno),. La bastono pli gravas por sondi la profundecon de la ŝlimo ol tiun de la akvo.

G.P.S-o, bildoj de *Google* kaj mapoj ne estas taŭgaj helpiloj por gvidanto. Iloj kiel G.P.S-oj povas ĉesi. Bildoj de *Google* kaj mapoj ne taŭgas, ĉar la ŝaneloj de la *Vadomaro* daŭre translokiĝas kaj la profundeco ŝanĝiĝas.

Antaŭ ol fari promenon kun partoprenantoj la gvidanto devas kontroli la itineron.

Poŝtelefono estas uzata nur en okazo de bezono, aŭ ekzemple se oni promenas al

*Simonszand* kaj reiros per boato.

Antaŭ ol oni ligis la vadomarajn bordojn de Groningen kaj Frislando (do antaŭ ol estiĝis *Lauwersmeer*) *Schiermonnikoog* distancis nur je ok kilometroj. Sed pro la ŝanelo antaŭ *Lauwersoog* la nuna deirpunkto al *Schiermonnikoog* estas *Broek*, kaj la distanco inter tiuj lokoj estas proksimume 20 kilometrojn longa. Antaŭ ol oni rajtas partopreni la transiron al *Schiermonnikoog* oni devas partopreni alian intertajdan marvadon.



Harm estas membro de la frisa marvada klubo *Arenicola*, latina nomo de ŝlimeja vermo.

## 25 novembro

Ni denove parolis pri ŝatokupoj. Ĉi-foje Johan prelegis pri dancado, sed unue ni babilis pri vetero kaj cetero. Johan iomete malfruis, ĉar li estis pro kurso en *Amersfoort*, kie li lernis pri memfido kaj kuraĝo. Do de nun Wil eble ne plu bezonas puŝi lin kiam li kiel prezidanto havas la parolvicon kaj ekparolu.

*Joseph*, la konga amiko de Luit, nun loĝanta en Pollando, denove havas problemojn pri sia restadpermeso. Tiu gravas tial, ĉar li nun ne ricevas subvencion de la socia asekuro. Li do bezonas monon el alia fonto. Ekzemple, pasintan jaron nederlandaj esperantistoj helpis lin finance dum iom da tempo.

Luit plie parolis pri *Hampshire Hotel* apud *Hoornse Meer*. Li estis tie laŭ invito de la sindikato. La hotelo estis belega, la antaŭvido de la pensioj estis malpli bela. Nelly parolis pri sia laboro en lernejo. Ŝi estas volontulo en la biblioteko de la mezlernejo *Willem Lodewijk*. Kiel volontulo ŝi havigas librojn kaj ankaŭ permesilojn por uzi la lerneajn komputilojn. Fakte, Nelly tiel multe parolis en Esperanto unuafoje. Gratulon! Wil invitis nin denove al la KER-ekzameno laŭ nivelo C1, kiu estas nivelo por progresintoj. Fakte, la ekzameno okazos ĉe UEA, por ke la dungitoj de la Centra Oficejo de UEA povu pruvi, ke ili regas la lingvon. Sed Katalin Kováts, la organizanto, kompreneble invitas ĉiujn nederlandajn esperantistojn ekzameniĝi. Neniu el la ĉeestantoj aliĝos, sed eble kelkaj el niaj legantoj?

Poste Johan prelegis pri la salonaj dancoj, kiel malrapida *valso* kaj *sambo*. En nederlandaj danclernejoj oni instruas kvin normdancojn: malrapida aŭ *angla valso*, rapida aŭ *viena valso*, *tango*, rapida *fokstroto* (*quickstep*) kaj malrapida *fokstroto* (*slowfox*). Kaj oni instruas kvin latinamerikajn dancojn: *ĉaĉao*, *rumbo*, *ĵajvo*, *sambo* kaj *pasodoblo*. Johan ion diris pri ĉiuj dek dancoj. Ni ankaŭ aŭdis la muzikon uzatan en danclernejo. Fakte ĝi ofte estas normala populara muziko, kiel ekzemple *A night like this* de *Caro Emerald*, kiu estas belega *ĉaĉao*. Ne moviĝi preskaŭ neblas. Do Johan montris kelkajn paŝojn de *ĉaĉao*, kaj ankaŭ de la aliaj dancoj li montris kelkajn paŝojn.

Li montris la dancoŝuojn de sia edzino, kiuj ja estas pli belaj ol viraj dancoŝuoj. Sed ambaŭ havas plandumojn el sveda

ledo. La planko de dancosalonoj estas el ligno. La ligno, la sveda ledo, kaj iom da parafino faras la ŝuojn glitigaj. Se la ŝuoj estas tro glitaj, oni simple forbrusu la parafinon, kio faras ilin glitrezistaj.



Fine de la vespero Luit konfesis, ke li iam lernis danci. Nelly diris, ke ŝi multe dancis kiam ŝi ankoraŭ ne estis edziniĝinta. Wil eksplikis kial ŝi komencis danci. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi estis en Pollando ĉe iu festo. La urbestro invitis ŝin al dancoek kaj pardonpetis, ke li ne estas bona dancisto. Ankaŭ Wil tion ekskuzis. Sed ho ve, ambaŭ ne sciis kion fari sur la dancejo. Wil volas neniam plu sperti tian embarason kaj decidis lerni la dancadon. Fakte ni ĉiuj iam dancis vole nevole.

## Urĝa peto



La kasisto ne estas magiisto. Li ja povas rompi panon, sed tiu ago ne rezultigos pli da panoj, sed nur aron da paneroj. Li ja povas fari fotokopiojn de monbileto, sed per tiaj kopioj li ne povas pagi la luprezon de la salono aŭ iun ajn fakturon. Por tiaj elspezoj necesas enspezoj kaj la plej grava "fonto de enspezoj" estas la kotizoj kaj abonpagoj. Pro tio la kasisto petas de ĉiuj, kiuj ne jam pagis la kotizon aŭ la abonon por la jaro 2011, transkontigi la ŝulditan sumon post nelonge. Kiom vi pagu kaj al kiu konto vi sendu la monon, vi povas legi sur paĝo 2 de ĉi tiu informilo. La kasisto anticipe dankas vin pro via baldaŭa reago.

## Averto kontraŭ dihidrogena monooksido

En la retpaĝo de nia membro Harm ni trovis averton kontraŭ *dihidrogena monooksido*.


Dihidrogena monooksido:

- ankaŭ nomata *hidroksila acido* estas la ĉefa substanco de acida pluvo;
- kontribuas al la varmdoma efiko;

- povas kaŭzi severajn brulvundojn;
- estas fatala se oni ĝin enspiras;
- kontribuas al la erodo de nia natura pejzaĝo;
- rapidigas korodadon kaj rustadon de multaj metaloj;
- povas kaŭzi elektrajn perturbojn;
- sin trovas en tumoroj de kanceruloj.

Malgraŭ la danĝero dihidrogena monooksido estas ofte uzata:

- kiel solvilo kaj malvarmigilo en la industrio;
- en nukleaj centraloj;
- kiel fajromalrapidigilo;
- dum multaj specoj de kruela bestesploro;
- kiel aldonaĵo al certaj fatras- kaj aliaj manĝaĵoj;
- por distribui ekstermilon. Eĉ post lavado iom de la kemiaĵo malpurigas la objekton.



Ĉu vi pretas helpi forigi la danĝeran dihidrogenan monooksidon? Tiam legu la informojn sur la lasta paĝo de *La Verda Stelo* por lerni kiel vi povas helpi.

## Sankta Francisko

Sankta Francisko de Asizo naskiĝis la 26-an de septembro 1181 kaj mortis la 3-an de oktobro 1226. Li estas unu el la plej famaj kristanaj sanktuloj kaj la fondinto de la religia ordeno *franciskanoj*, unu el la ĉefaj ordenoj de la katolika eklezio.

Sankta Francisko naskiĝis en *Asizo* (Umbrio) kiel *Francesco BERNARDONE*. Lia patro, kiu ofte vendis tolaĵon en Francio, estis riĉa sed nenobela komercisto. Ankaŭ kiam lia filo naskiĝis, li estis en Francio. Tial li nomis la infanon *Francisko*.

Francisko ne volis fariĝi komercisto, sed li volis akiri gloron kaj titolon por la familio kaj por si mem. Li batalis interalie en la milito kontraŭ *Peruĝio*, apuda malamika urbo. Sed anstataŭ akiri gloron kaj titolon, Francisko kaptiĝis kaj poste, suferis longedaŭran malsanon.

Dum ĉi tiu tempo Dio parolis al li pere de sonĝoj. En unu sonĝo Francisko estas en granda halo kun pendigitaj ŝildoj, ĉiuj markitaj per *Sankta Kruco*. Li aŭdis voĉon, kiu diris: "Ĉi tiuj estas por viaj soldatoj." Li pensis, ke la sonĝo signifas, ke li estos tre riĉa princo, sed fakte la soldatoj estos la franciskanoj.

La milita gloro de Francisko ne venis kaj post la kaptiteco, malsano kaj sonĝoj, li iom post iom komprenis la malplenecon de sia vivo kaj de la monda gloro.

Anstataŭ al milito Francisko turnis sin al preĝado kaj helpo de malriĉuloj, do al humileco anstataŭ honoro. Tiel li ekribelis kontraŭ sia patro, kiu volis ke Francisko fariĝu komercisto kaj uzu riĉaĵon por profito, ne por malriĉuloj.

En la printempo de la jaro 1205 Francisko staris en la urbo apud la episkopo,

senvestis sin kaj redonis la vestojn al sia patro. La patro diris: "Nun mia filo vere estas freneza..."

Post tio Francisko vivis kiel ermito kaj predikis pri simpla kaj malriĉa vivo laŭ la evangelioj. Li allogis adeptojn, eĉ inter riĉuloj.

Kiam li havis dek du adeptojn, li verkis por la nova ordeno mallongan regularon, kiun aprobis la papo. Tiel ekestis la ordeno de la franciskanoj. La fratoj de la ordeno votis tri regulojn:

- malriĉeco
- obeado
- ĉasteco

De tiam la nombro de franciskanoj kreskis multe. Francisko fondis ankaŭ du aliajn ordenojn:

- unu por virinoj (kun *Sankta Klara de Asizo*), kiu nomiĝas *Malriĉaj Klaranoj*
- kaj alian por laikoj, kiu nomiĝas la *Tria Ordo*



En 1219 dum la *Kvina Krucmilitiro*, Francisko iris al Egiptio por kristanigi la Sultanon, sed sen sukceso.

Post tiu milito Francisko iris hejmen. La ordeno multe kreskis kaj bezonis tre fortan kaj kapablan estron. Francisko sciis, ke li ne estas tiel forta kaj ne kapablas gvidi la grandegan ordenon. Frato *Petrus Cattani* estis la nova estro de la ordeno.

Francisko mortis en *Portiuncula*, Italio. La festotago de Sankta Francisko estas la 4-a de oktobro, la dato kiam li estis entombigita en la preĝejo *San Giorgio*.

En 1228 Francisko estis sanktigita kaj oni konstruis la bazilikon de Sankto Francisko en Asizo. En 1230 oni translokiis la korpon de Francisko al ĉi tiu baziliko.



Bedaŭrinde tertremo en Asizo kaŭzis detruon en la 26-a de septembro 1997. La baziliko de Sankto Francisko estis tre difektita. Parto de la pentraĵoj kaj la tegmento de la baziliko estis detruitaj. Kvazaŭ ĵigo oni povis kunigi la pulvoron de la pentraĵoj kaj ŝtonoj. Oni rekonstruis la bazilikon parte.

## 6-a Azia Esperanto-kongreso

La 6-a Azia Esperanto-kongreso okazis de la 19-a ĝis la 23-a de junio kun pluraj prelegoj kaj aliaj programeroj. La programo similas tiun de UK: interkona, mongola kaj internacia vesperoj. Mongola muziko estas tre speciala.

Okazis *oratora konkurso*. La ĵurio ne bone klarigis la regulojn, do ĉiuj tri partoprenantoj ricevis premion! Juna mongola esperantisto, Tuya, ludis pianon. Ŝi ludas profesie, sed bedaŭrinde la piano havis malpli altan kvaliton. Poste ŝi klarigis al mi, ke ŝi hontis ke ŝi devis uzi tiun malbonan pianon,

Por la aŭkcio mi donacis kompaktdiskon de *Kajto*, kiun iu aĉetis por 35 eŭroj!

*Pierre*, kiu scias multe pri vinoj profesie, kunportis tre bongustan vinon el Francio. Li invitis kelkajn geamikojn, kaj ni trinkis bonan francan vinon en mia hotelĉambro. Agrabla etoso!



La kongresan libron ni ricevis nur lundon posttagmeze, ĉar la teksto de iu ministro ne alvenis ĝustatempe. Al mongolaj esperantistoj mankas la sperto organizi kongreson. Ili ankaŭ ne ofte vojaĝas al eksterlandaj kunvenoj.

La temo de la kongreso estis *Azia Harmoniigo per Esperanto*.

Ĉe la malfermo mi salutis nome de *Esperanto Nederland*. Al la prezidanto de la LKK mi donacis kompaktdiskon de Kajto.

Partoprenis ĉirkaŭ 200 esperantistoj: el Bangladeŝo, Srilanko, Ĉinio, Koreio, Japanio, Svisio, Danio (*Kim Henriksen* kun sia akordiono!) kaj el aliaj landoj.

La salonoj en la kongresejo havis la nomojn de famaj mongolaj esperantistoj: *Khayankhirvaa, Richen, Dogsuren*. La plej granda salono estis salono Zamenhof! Mi aŭdis prelegon pri la mongolaj esperantistoj.



Mi partoprenis dum varmega vetero duontagan ekskurson al diversaj interesaj lokoj en Ulanbatoro: la templo *Gandan*, la granda ĉefplaco *Sukhbaatar* kaj la monteto *Zaishan*.

Post la kongreso mi partoprenis en kvintaga ekskurso sude de Ulanbatoro. Ni tranoktis en jurto, granda mongola tendo facile transportebla, en kiu troviĝas tri aŭ kvar litoj. Niaj manĝejoj, duŝejoj kaj necesejoj troviĝis en lignaj konstruaĵoj.

Ni vizitis la malnovan ĉefurbon *Kharkorum*, sablajn dunojn, bordon de rivero, naciajn parkon *Hustai* kun sovaĝaj *przewalski*-ĉevaloj. Ni vojaĝis en aŭtobuseto dum multaj horoj sur vojoj ne ĉiuj asfaltitaj. La pejzaĝo estis belega. Vastaj ebenaĵoj kun ĉevaloj, kaproj, bovinoj kaj kameloj! Mi ne povas bone priskribi kial la ebenaĵo estas tiel bela. Vi mem devus tien iri!

La lastan nokton ni trapasis en hotelo denove en Ulanbatoro, de kie multaj esperantistoj kune flugis al Moskvo (okazas nur unu flugo en tago). Nur tiam ni adiaŭis unu la aliajn!

Vespere, la 28-an de junio, mi revenis en Groningen. Laca, sed tre kontenta.

## Verzoek aan leden en abonnees

De penningmeester zou het bijzonder prettig vinden wanneer iedereen binnenkort de contributie of het abonnementsgeld voor het jaar 2011 zou hebben betaald.

Hoeveel u dient te betalen en naar welke rekening u het geld moet overmaken kunt u lezen op bladzijde 2 van deze *informilo*.

Bij voorbaat hartelijk dank voor uw spoedige betaling.

## Sankta Nikolao-festo en Bulgario

En letero el Bulgario mi legis jenon pri la festo de Sankta Nikolao:

La 6-an de decembro ankaŭ ni festas la tagon de Sankta Nikolao same kiel vi, sed la infanoj ricevas la donacojn nur en la nokto antaŭ kristnasko, laŭ sama maniero: tra la fumtubo!

Okaze de la festo nepre estu sur la manĝotablo bakita karmo, preparita laŭ speciala maniero. Ĝi estu farĉita per ete tranĉita kaj fritita cepo, muelitaj nuksoj, ruĝa kaj nigra pipro, kaj petroselo.

Satureon kaj salon oni aldonu laŭguste.

Kiam la karmo estas farĉita per la preparita miksaĵo, ĝi estu alkudrita kaj post tio kovrita per panpasta. Tiam oni metu ĝin en la bakforon por ĝin baki.

Estas manĝaĵo tre bongusta.

Rekomendite estas provi tion kaj dezirita estas bona apetito!



## Averto kontraŭ trokredemo

La vera averto ne estas kontraŭ dihidrogena monooksido. Dihidrogena monooksido estas tre komplika nomo por akvo. Eble vi rememoras, ke  $H_2O$  estas la kemia simbolo de akvo. Sekve vi povas ankaŭ kompreni, ke akvo vere estas oksido de hidrogeno. Kiam vi nun relegas la artikolon pri dihidrogena monooksido, kaj ĉie anstataŭigas dihidrogenan monooksidon per akvo, la artikolo restas same valida. Sed la kemiaĵo aspektas ne plu danĝera.

La vera averto estas kontraŭ tro facila kredo, ke io estas malbona, sen mem pripensi la aferon. En 1997 la 14-jara knabo *Nathan Zohner* ricevis premion, kiam li uzis dihidrogenan monooksidon por pruvi, ke mediprotektantojn ni emas kredi tro facile.

Se vi mem volas legi pli pri dihidrogena monooksido, Interreto estas plena de informoj. Legu ekzemple:

[www.dhmo.org/](http://www.dhmo.org/)

[www.math.psu.edu/tseng/H2Ojoke.html](http://www.math.psu.edu/tseng/H2Ojoke.html)

[www.conservapedia.com/Dihydrogen\\_monoxide](http://www.conservapedia.com/Dihydrogen_monoxide)  
aŭ [en.wikipedia.org/wiki/Dihydrogen\\_monoxide](http://en.wikipedia.org/wiki/Dihydrogen_monoxide)



Ĝojigan Kristnaskon  
kaj  
Feliĉan Novjaron

deziras al vi  
la estraro kaj redakcio

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND  
T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – *taal zonder grenzen*